

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 01/12/2019 Kvarcentkvindekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **788,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **291,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **270,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **227,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.97



En P.A.G. la Objektoj subdividiĝas en la jenajn:
Rekta, Traktativa, Dativa, Ablativa, Alternaj, kaj Diversaj Objektoj. La Adjektoj en Manieraj, Kaŭzaj, Koncedaj, Supozaj, Kondiĉaj, Akuzativaj, Nerektaĵ, Rekte Infinitivaj, Nerekte Infinitivaj, Nominativaj, Lokaj, Lokadjektaj, Move Lokadjektaj, Spacaj, Pozicimovaj, Punktaj, Tempaj, Tempkomencaj, Finaj, Nombraj, Stataj, Sitaciaj, Kondiĉaj, Koncedaj, Originaj, Rezultaj, Celaj, kaj Traktativaj.

La nura utilo estas, ke ĉi tiel ĝi povas montri, kiaj verboj uzas kiun specon de Objekto/Adjekto, sed tio estas pli afero de teksto ol de gramatiko.

Proksimsemajne mi montros pli simplan kaj sufiĉan dividon en nur du specojn.

Marcel Leereveld.



AE deziras feliĉan naskiĝdatrevenon al Marcel

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Gratulojn al Marcel Leereveld – 102 jaraĝa!*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)***Zamenhofa genio en mia ĝardeno.****LA GENIO DE ZAMENHOF.**

La korelativoj estas unu el la geniaĵoj de Zamenhof. En Esperanto neniu radikoj (escepte ĉe –njo kaj ĉjo) estas ŝanĝebla, nek en signifo nek en formo. Ankaŭ ĉiu el la 45 korelativoj estas radikoj, oficiale ne konsistanta el partoj. La genio estas, ke neoficiale ni povas dividi ĉiun korelativon en signifajn kaj en gramatikajn partojn, ĉu Zamenhof intencis tion aŭ ne. Ĉiu korelativo havas la centran literon “-i-“, kies signifo estas “pri”. Ĉiu korelativo havas post tiu “-i-“ unu aŭ du literojn, kiuj montras la gramatikan kategorion kaj havas la specialan signifon de la naŭ specoj: “-o-“ substantiva (aferoj), “-a-“ adjektiva (specoj), “-u-“ substantiva/adjektiva (personoj kaj indikativa), “-e” adverba (loko), “-am” adverba (tempo), “-al” adverba (kaŭzo/motivo); “el” adverba (maniero); “-om” adverba (kvanto); “-es” adjektiva (poseda). Antaŭ la centra “-i-“ troviĝas aŭ nenio, (por ĝenerala uzo); aŭ “k-“ (por demando); aŭ “t-“ (por indiko); aŭ “ĉ-“ (ĉioinkluziva); aŭ “nen-“ (ĉioekskluziva).

En ĉi tiu neoficiala subdivido ekz. “kial” signifas “Speciala demando (= “k-“ (por scii = “-i-“) la motivon) de iu ago (= “-al”). Sed ĉi tiu neoficiala klarigo de la signifoj de ĉiu korelativo validas ankaŭ por la oficiala kombinaĵo de signiferoj en unu radikoj. Jen do la oficialaj signiferoj de ĉiu korelativo: (forlasitaj estas tiuj kun “nen-“ kaj “ĉ-“, kiuj havas tre malofte derivaĵon):

IO = pri ĝenerala signifo de afero konkreta aŭ abstrakta (“*something*”).

KIO = pri speciala demando por ricevi informon pri io specifa (“*what*”).

TIO = indiko de la nomo de la afero (“*a rose*”). Kio estas tio? Tio estas rozo.

Ne ekzistas derivaĵoj, nur pluralo kaj akuzativo.

IU = pri ĝenerala signifo de persono (“*somebody*”). Aŭ kiel indika adjektivo (“iu rozo”).

KIU = pri speciala demando por ricevi informojn pri iu specifa (“*who*”). Aŭ adjektivo (“kiu rozo?”)

TIU = indiko de la nomo de la persono (“*John*”). Kiu estas tiu? Tiu estas John. Aŭ adjektivo.

Ne ekzistas derivaĵoj, nur pluralo kaj akuzativo.

IA = ĝenerala adjektivo (“*such a*”).

KIA = pri speciala demando por ricevi informojn pri la kvalitoj de substantivo (“*what ... like*”).

TIA = indiko de la kvalitoj de substantivo (“*red*”). Kia estas tio? Ĝi estas ruĝa.

Ne ekzistas derivaĵoj, nur pluralo kaj akuzativo.

IE = pri ĝenerala signifo de la loko (“*somewhere*”).

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

KIE = pri speciala demando por ricevi informojn pri la loko (“*where*”).

TIE = indiko de la nomo de la demandita loko de io (“*in the vase*”). Kie estas la rozo? En la vazo.

Ne ekzistas derivaĵoj, nur al-akuzativo.

IAM = pri ĝenerala signifo de la tempo (“*at some time*”).

KIAM = pri speciala demando por ricevi informojn pri la tempo (“*when*”).

TIAM = indiko de la nomo de la demandita tempo de io (“*since last Friday*”). El de Vendredo.

Derivaĵoj: “La tiamo” kaj “Tiama festeto: “tiami” = okazi tiam.

IAL = la ĝenerala signifo de la kaŭzo aŭ motivo de okazo (“*for some reason*”).

KIAL = demando ricevi informojn pri la kaŭzo aŭ motivo de ago (“*why*”, “*wodurch*”, “*warum*”).

TIAL = indiko de la nomo de la demandita kaŭzo aŭ motivo (“*therefore*”). Tial mi venis.

Derivaĵoj: “La ialo” (*the reason*); “la kialo” (*the question*) (tre malofte uzebla), “la tialo” (*that cause or motive*).

IEL = la ĝenerala signifo de la maniero (“*in a way*”).

KIEL = demando pri la maniero (“*how*”).

TIEL = indiko de la demandita maniero (“*in that way, so*”). “Li laboras same tiel kiel lia patro”.

Neniu derivaĵoj.

IOM = la ĝenerala signifo de la kvanto (“*a certain quantity of something*”).

KIOM = demando ricevi informon pri la kvanto de io (“*how much (many) of*”).

TIOM = indiko de la demandita kvanto (“*so much, so many*”). Kiom da kilogramoj?

Derivaĵo: “La kioma” = Orda Numeralo (*the howmanyth*), La tioma (*the so-many-th fojo*”).

IES = apartenanta al persono (“*somebody’s*”).

KIES = apartenanta al kiu persono? (“*whose*”).

TIES = apartenanta al tiu persono: Ties violono rompiĝis (“*that person’s violin broke*”).

Neniu derivaĵoj.

Iuj korelativoj povas esti parto de vortkunmetaĵo: “La tiuvespera festeto”.

Do kvankam oni povas, kiel farita en la listo ĉi supre, oficiale trakti la kvardek-kvin korelativojn kiel nerompeblajn radikojn kun po pluraj signiferoj, oni povas neoficiale rompi ĉiun el ili en tri partojn, ĉiu kun sia aparta signifo. Ankaŭ en tio kuŝas la genio.

Proksimsemajne pri la subjunkcia uzo de la k-korelativoj, kaj pri speciala uzo de “kiel” kaj “tiel”.

Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

HISTORIO NIN INSTRUU !

Ĵusemajne mi menciis, ke en la periodo de 2005 ĝis 2016 la plejmulto de la membroj de A.E.A. preferis min, kaj aliajn melburnanojn, sub la tero anstataŭ sur la tero. Tio ne estis ŝerco: tio estis pro nia daŭra kritikado ante la tiaman estraron. Mi kaj aliaj melburnaj membroj penis ŝanĝi la decidojn de la tiama estraro, ĉar ni opiniis ke tiuj decidoj estis malbonaj por A.E.A. kaj ĝiaj membroj. Tiuj decidoj enhavis la uzon de la financoj de nia Asocio, kaj A.E.A. perdis tiam tre grandajn sumojn da mono por financi senvalorajn projektojn en Aŭstralio kaj Indonezio, projektoj de kelkaj membroj. La estraro krome eksigis min kaj aliajn pro tiu kritikado, kun la helpo de la neŭtraluloj, precipe en Sidneo kaj Adelaido, kiuj postulis ke ni ŝafe akceptu ĉion venantan el de la estraro.

Ne valoras ŝovi la negativajn periodojn de A.E.A. sub la tapiŝon: ni devas memori ilin por lerni el ili, same kiel ni memoru, por lerni el ili, la gradajn pozitivajn periodojn de A.E.A., kiaj la akcepto en la lernefinaj kaj universitataj ekzamenoj en Tasmanio en la finaj jaroj de la 1950aj, kaj la deviga instruado en la mezlernejo de Ivan Maddern en Morwell, kaj la grandega propagandado kaj sukcesoj de Ralph Harry. Kaŝi faktojn estas malhonesto kaj nehelpema, kaj similaj, pozitivaj aŭ negativaj, ŝancoj povos okazi pli tuje ol ni pensas.

Marcel Leereveld.



Lingva festivalo en Hurstville



Sabaton, la 23-an de novembro, okazis Georges River Language Festival en la publika biblioteko de Hurstville, sud-okcidenta antaŭurbo de Sidnejo*. Malgraŭ sia malgrandeco kaj limigita reklamado, kaj iom da teknikaj problemoj je la komenco, ĝi estis sukcesa evento: multaj homoj neniam antaŭe viditaj de ni ĉeestis.

Kiel eksperimento, oni ĉi tiam petis ĉiun prelegontojn ne nur paroli pri sia lingvo, sed ankaŭ diri rakonton en tiu lingvo – kun traduko en la angla aŭ antaŭe, aŭ dume (sur la ekrano) aŭ poste. D-ro Alan Downes uzis rekvizitojn por sia rakonto en Sanskrito pri Kriŝno kaj la Rano. Aliaj lingvoj estis la tamila, la ĉina, la rusa, la kalaŝa (de malgranda regiono de nord-okcidenta

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Pakistano) kaj, kompreneble, Esperanto. Bedaŭrinde, parolado pri Tokipono devis esti nuligita pro la lastatempa nedisponbleco de la parolonto (parolunto?).

Do, kiaj estas la rezultoj de la eksperimento? Laŭ mi, la plej sukcesaj estis la rakontoj, kiuj havis ĉiun frazon samtempe tradukitan sur la ekrano. Tiuj ebligis la spektantojn senti, kvazaŭ ili komprenus la fremdan lingvon.

Pluraj homoj alvenis al mi je la fino por danki nin pro tre agrablaj kaj informplena sperto.

(* Interesa detalo pri la loko: tio estis la biblioteko de kiu mi – kiel adolesko – unue prunteprenis libron "Teach Yourself Esperanto", kiu komencis mian vivlongan amon de nia kara lingvo.) Raportis **Jonathan Cooper**



Bildo: Lingvisto D-ro Gregory Cooper (kiu ankaŭ prelegis pri sociolingvistiko) respondis al demandoj pri la kalaŝa lingvo



Malbabeligi la mondon

Karaj,
ĉe https://www.deutschlandfunkkultur.de/esperanto-volapuko-la-klingona-planlingvoj-nuntempe.976.de.html?dram:article_id=464467 vi povas aŭskulti la elsendon "Malbabeligi la mondon" en Esperanto. Amike, **Peter Weide**



Saluton, Marcel

gratulojn al sinjoro Marcel

Sendube la 4a de decembro estis feliĉa por vi; tiel estu ankaŭ ĉiun tagon de 2020.

Via artikolo en AE454 memorigis min, ke mi iam gratulis al Esperantistino pro eniro en ŝian 75an jaron. "Vi malpravas!" ŝi lamentis, "Mi estas nur 74 jaraĝa". Nu, en angloparolantaj landoj oni kalkulas la lastan kompletan vivojaron (74), sen en (mi supozas, ĉiuj) eŭropaj landoj, la jaron en kiu oni celas atingi la ontan datrevenon (75).

Cetere Marcel, vi Esperantistiĝis en 1934: tiu jaro ankaŭ gravas por mi; vi sendube povos diveni kial 😊

Vera Payne



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

La 7a de Decembro estos la unua sabato. Venu al nia amikema kunveno. **Roger S**



El Melburno

gratulojn al sinjoro Marcel

London, la 2an de decembro deko da esperantistoj de Melburno kaj ties ĉirkaŭaĵo renkontiĝis en tajlanda restoracio, apud Ross House, la kutima renkontejo, por festi la 102an datrevenon

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

de la naskiĝo de Marcel. Estis ĝojiga vidi ke reaperis homoj, kiuj de pluraj jaroj ne ĉeestis kunvenojn kiel John Cougan aŭ Dorothy Bysouth. Sed tia estas la alloga povo de Marcel !



Franciska Toubale



Heroa kaj Leandro.

Jen simpla tragedieto el la legendaro de la antikvaj Helenoj. Tamen, iam ĝi estis bone konata al ni modernaj okcidentuloj.

Heroa estis la bela, juna pastrino en la turo de Afrodita ĉe *Sestos*, sur unu marbordo de la *Helespont*, la markolo kiu dividas Azion de Eŭropo. Sur la alia flanko, ĉe *Abydos*, loĝis Leandro, forta juna best-ĉasisto. Iel ili renkontiĝis – kaj enamiĝis.

Tiam okazis ke ili ofte kunestis. Vespere Heroa lumigis lampon en sia tura fenestro, kaj Leandro vidinte tiun lumon entreprenis la danĝeran naĝadon tra la maro al sia amatino ---- kaj matene la duan fojon hejmen denove.

Sed kiom da amĝuego ili spertis dum tiu nokto!

Tamen, tiu ĝoja somero ne povis daŭri senfine. Venis aŭtuno kun pli fortaj ventoj kaj ondoj, kaj tempestoj. La longaj noktoj iĝis pli malfacile elteneblaj.

Unu storma nokto Heroa supozis, ke Leandro ne venus; tamen ŝi flamigis sian lampon antaŭ ol enlitiĝi. Pasis nokto sen vekiĝo. Mateniĝis----ŝi tuj remarkis kun alarmo, ke ŝia lampo

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

estingiĝis ! Ŝi kuris al la fenestro por elrigardi----kaj ekvidis sube, sur la strando, sian dronintan amanton.

Kun hororo kaj kulposento ŝi saltis el sia turo. Ŝia senviva korpo kuŝis apud li, kiun ŝi amis.

Interesa fakto : *Lord Byron*, la poeto, faris saman naĝon en majo. Li raportis la rezulton en amuza poemeto, kiu finiĝas per tiu linio : « Leandro droniĝis, kaj mi spertis malvarmumon. »

Re-rakonto de Tomo.

Erhard Claus

Pri Melburno

(Mi sendis al vi raporton pri mia vizito al la Melburna Esperanta Kunsido. Kam Lee) Londen 11an Novembro, 2019, mi iris al Ross Domo en Flinders Strateto, Melburno kaj mi ĉeestis la kunsidon de Melburna Esperanta Societo.

Marcel parolis pri la fama Usonano, Naom Chomsky, kiu kelkfoje estas nomita la patro de modernaj lingvistikoj. Marcel parolis pri kelkaj teorioj de Naom, kiuj estis refutitaj aŭ serioze defiitaj.

Mi prelegis pri mia vizito al la fama Indonezia insulo, Filo de Krakatoa, kiu lokiĝas 50 km okcidente de Javo. Tuta raporto pri ĉi tiu mirinda ekskurso estas videbla en Septembra 2018 eldono de la ĵurnalo ESK.

La lasta parto de la kunsido estis pri la moderna Esperanta opero, "Sternenhoch", kiu estis prezentita de la Nacia Teatro de Prago.. Ivan Acher estas la komponisto de la opero, kiu videblas ĉe

https://www.youtube.com/watch?v=HU1rPlvCjA&list=PLYAQ82KNFI_cIR_NJIFUNBBZaliOVTEQE&index=7

Verŝajne Joanne kaj PeterJohns translokiĝos al Brisbano dum frua parto de 2020 kaj estas bona novaĵo al la Kvinslandanoj, ĉu ne?

Fotoj:

1) MES grupfoto:
Grupfoto de la membroj de la Melburna Esperanta Societo kun mi. En la fono estas granda ekrano, sur kiu eblis montri bildojn rilatajn al mia prelego de Krakatoa, kaj la operon "Sternenhoch".



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

2) Ekskurso kun aliaj Esperantistoj en la insulo, Filo de Krakatoa. En la fono estas la vulkano de Filo de Krakatoa.



3) Scenejo dum la Ario, 'Via ino mortinta' el la opero "Sternenhoch" verkita de Ivan Archer, ĉe la Nacia Teatro de Prago,. Maldekstre estas la fantomo de Helga (Vanda Šípová), kiu kantas la kanton. Sidante apud la tablo estas Princo Sternenhoch (Sergey Kostov), kiu sonĝas pri la apero de la fantomino.



Kam Lee



EL Nederlando

Gratulojn al sinjoro Marcel Amike, **Det Koning**

Okaze de lia naskiĝdato (je la kvara de decembro) mi kore gratulas kaj aldonas filmeton. Espereble li ĝuas la festotagon kaj la bildojn de tiu filmeto. La titolo estas "plezant" kaj mi supozas, ke li komprenas tiun vorton; estas preskaŭ nederlanda. ('Plezant' estas flandra vorto kaj la signifo estas 'plezura').



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Unuiĝintaj Nacioj

Movada temo: UN 75-jariĝas: Esperanto bezonas Unuiĝintajn Naciojn, sed Unuiĝintaj Nacioj bezonas esperantistojn

Renato Corsetti

Malgraŭ la disvastiĝo de potenĉegaj komunikaj iloj aŭ eble ankaŭ pro ili, la mondo restas ĉiam la sama, ĉar homoj restas samaj kun siaj virttoj kaj malvirttoj. Certe ekzistas la esperantistoj, kaj ilia toleremo kaj komprenemo por aliaj homoj kaj popoloj kaj ilia serĉo pri justeco, egaleco kaj paco. Sed samtempe ekzistas multaj aliaj homoj, kiuj predikas malamon kontraŭ la plej malfortaj, maltoleremon al aliaj kulturoj, perforton por solvi konfliktojn. Unuvorte, la nuna mondo estas kiel la mondo en la tempo de Zamenhof aŭ eĉ en la tempo de la antikva Babilono. La mondo ŝanĝiĝas nur pri detaloj, ne pri la kerno.

Eĉ male, dum la lastaj jardekoj progresas en multaj lokoj de la mondo maltoleremo kaj perfortemo ĉiam pli kaj pli.

En ĉi tiu situacio Esperanto restas, por uzi la versojn de Kalocsay:

Ne glora kaj fiera,

*Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera.
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

Fortoj, kiuj esprimis de tempo al tempo sian subtenon al Esperanto, estas la mondaj organizaĵoj, kiel Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ĉar principe ili havas la samajn celojn kiel ni: plibonigi la mondon. Pro tio ni bezonas ilin por disvastigi Esperanton en la mondon. Diris Zamenhof: “La registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta”.

Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko povus esti niaj aliancanoj, eĉ se en la nuna mondo ankaŭ ili ne fartas tre bone.

Se UN vokas, UEA respondas.

Ne hazarde la kongresa temo en la venonta UK en Montrealo estas: “UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝanta mondo.”

La vortumo de la temo sekvas la ŝablonon de UEA pri neŭtraleco kaj

pozitiveco ĝis la morto, ĉar, kiel mi diris antaŭe, la mondo estas ĉiam la sama kaj eventuale malpliboniĝas, eĉ se ni kaj UN volas dialogon kaj interkompreniĝon.

Nu, kongresaj temoj estis ofte ĝis nun nur ĝenoj por la kongresanoj, tuj forgesataj antaŭ ol eniri la vagonaron aŭ aviadilon por reveni hejmen. Ĉu vi ne kredas min? Bonvolu citi la lastajn 5 kongresajn temojn de la UK-oj, kiujn vi ĉeestis!

Ĉi-jare la afero volas esti pli serioza kaj jam oni faras grandajn provojn aranĝi plenajn kunsidojn pri la temo, dissendojn al neĉeestantoj, kaj eblon de neĉeestantoj aŭdigi sian voĉon. Koloraj flagoj flirtos kaj oratoroj oratoros, ktp.

Tio estas io bona. Finfine oni parolos pri io serioza kaj serioze ligita al Esperanto; sed tio, laŭ mi ne sufiĉas.

Mi pensas, ke ĝi devas iĝi “movada temo”, temo de la tuta movado, ankaŭ por tiuj multaj, kiuj pro multaj kialoj ne povos vojaĝi al Montrealo. Ne temas pri festado de la 75-jariĝo de UN, temas pri decido pri tio, kion ni povas fari por helpi UN-on atingi 100 jarojn, por ke ĝi helpu nin plibonigi la mondon per Esperanto.

Ni devas debati pri tri grandaj agadkampoj de UN kaj Unesko:

Homaj rajtoj. Ĉu ni volas aŭ ne, ni estas la solaj batalantoj en la mondo por la lingvaj homaj rajtoj, kontraŭ diskriminacioj bazitaj sur la lingvo, kiel UN estas la batalanto pri homaj rajtoj ĝenerale. Bonvolu legi ree la deklaron pri homaj rajtoj, kiun vi trovas en Esperanto en <https://tinyurl.com/yxd7uv5v>, debatu pri ĝi en via loka klubo kaj en via landa informilo. Se vi atingas konkludojn, kiujn vi volas konigi al la debatantoj en Montrealo, por ke ili konsideru vian opinion dum la pretigado de la rezolucio, simple skribu al mi, renato@esperanto.org, kaj mi komunikos tion al ili.

Paco. Memoru niajn glorajn tradiciojn pri paco, de la kontaktoj kun

Bertha Von Suttner ĝis la esperantistoj mortigitaj de faŝismaj, militemaj reĝimoj tra la mondo. Se vi ne ŝanĝis vian opinion pri tio, vi eble volos subteni la agadon de UN por eviti armilkomercadon kaj entute militojn. Diskutu ankaŭ pri tio en via loka klubo aŭ en via landa informilo. Informiĝu pri la sistemo de UN-asocioj, <https://tinyurl.com/y4cpdjlh>, kaj de Unesko-klubo, <https://tinyurl.com/y5a9v42o>, kaj kunlaboru kun ili loka aŭ lande. Raportu al UEA pri via kunlaboro.

Evoluo. Mia daŭra mantr/slogano estas, ke ni volas pli bonan mondon, pli justan mondon en la kampo lingva-kultura. UN kaj Unesko volas pli bonan mondon ĝenerale.

Kion ni povas fari tiurilate? Aldone al tio menciita en la punkto ĉi-supre bonvolu legi ĉi tion: <https://tinyurl.com/y4755pbs>.

Diskutu pri tiuj celoj en viaj lokaj grupoj kaj en viaj landaj informiloj. Se vi atingas konkludojn, kiujn vi volas konigi al la debatantoj en Montrealo, agu same kiel ĉi-supre: skribu al mi, renato@esperanto.org, kaj mi komunikos tion al ili.

Unuvorte, informiĝu pri UN kaj Unesko kaj disvastigu Esperanton kiel elementon de la programo de UN kaj Unesko por plibonigi la mondon.

Fine, se vi volas esti aparte afablaj, reaperigu ĉi tiun artikolon en via loka bulteno, fejsbuka paĝo, landa informilo ktp.

